

## Ĝeneralaj informoj

**Antaŭpago:** Por ĉiu persono 50 eŭroj.

**Aliĝdato:** Ni kalkulos laŭ la alvendo de la aliĝo papera aŭ retroŝta, se la aliĝanto ĝis la limdato forsendas la antaŭpagon. La aliĝo validas nur post alveno de la antaŭpago kaj post nia konfirmo.

**Malaliĝo** ĝis la 31-a de majo: Repago de via kompleta aliĝkotizo sen subtraho. Malaliĝo ĝis la 30-a de junio: Subtraho de 30 eŭroj por ĉiu aliĝinto. Poste/neanoncita nealveno: Neniu repago de la aliĝkotizo; eventuale necesos pagi kostojn de la domo (por rezervitaj ĉambroj). Ni vin tre petas informi pri eventuala neveno por eviti senutilajn elspezojn. Transdono al alia persono: Neniu subtraho; pagendas laŭ la nova aĝokategorio, tamen minimume la sama sumo kiel la unua aliĝinto.

**Kontoj:** N-ro 2596 58-301, EsperantoLand e. V., ĉe "Postbank Hannover" (germana banka kodo 250 100 30; internacia kontonumero - IBAN: DE07 2501 0030 0259 6583 01, internacia banka kodo - BIC: PBNK DE FF), indiku "IK". Konto eold-g, EsperantoLand, ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj same ĉe Universala Esperanto-Asocio. Eblas antaŭpago per sendado de ĉeko aŭ eŭro-monbiletoj (je risko de la sendanto) al nia suba adreso.

**Rabato** por programkontribuantoj kaj helpantoj laŭ interkonsento.

**Sendu vian aliĝilon al EsperantoLand e. V.,** Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus, 10551 Berlin, Germanio, lu.esperanto@gmx.de, tel. +49-30-685 58 31, telekopiilo +49-30-68 05 70 11, [http://www.esperantoland.org/internacia\\_kongreso](http://www.esperantoland.org/internacia_kongreso)

-----  
 Mi/ni ŝatus loĝi en dupersona,  en unupersona ĉambro.

Mi/ni ŝatus loĝi en tri-/kvarpersono ĉambro.

Mi/ni ŝatus loĝi en \_\_\_\_\_

Ebla kontribuo al la programo/rimarkoj:

Vi rajtas mencii mian nomon sur la IK-retpaĝoj.

Mi antaŭpagos 50 eŭrojn por ĉiu aliĝinto.

Dato

Subskribo

## 1-a Internacia Kongreso


*organizata de EsperantoLand*

*pri Esperantujo, Esperanto-agado kaj la „ekstera mondo“*

*2010-08-06 ĝis 13*

**Ĉeftemo: Kiel disvastigi Esperanton,  
kiel kreskigi Esperantujojn?  
Kadra programo, promenoj, ekskursoj**

*Kongresi somere en bela urbo*



**Strasburgo**

**- apud la franc-germana landlimo -**

**Por la kreskigo de Esperantujo  
[www.EsperantoLand.org](http://www.EsperantoLand.org)**

## Kongresi somere en bela urbo

La unua "Internacia Kongreso" (IK), organizata de EsperantoLand, okazos ĉi-aŭguste en Strasburgo - centre en Eŭropo, je la limo inter Francio kaj Germanio. Ni invitas vin kunveni en tiu bela eŭropa urbo kun vidindaj konstruaĵoj.

### Pri Esperanto, Esperanto-agado kaj la ekstera mondo

En la kongresa parto ni planas prelegojn kaj diskutojn pri Esperantujo kaj Esperanto-agado, sed ankaŭ prezentojn pri la "ekstera mondo" - do fakajn kaj eble popularsciencajn prelegojn. En la parto pri Esperantujo kaj Esperanto-agado la gvida demando estos:

*"Kiel disvastigi Esperanton, kiel kreskigi Esperantujon?"*

Kion ni faru kaj povas realisme fari pri publikaj rilatoj aŭ rilate al instruado? Kiel informi loke aŭ sukcese gvidi grupon? Kiaj strukturoj necesas por antaŭenigi la revon kaj la realecon de Esperanto? Kiujn specifajojn prezentas ekzemple Afriko, Nepalo aŭ Suda Ameriko kaj kiujn Eŭropo? Jen kelkaj eblaj demandoj. – Ni krome planas plurajn kulturajn aranĝojn, ekzemple pri libroj kaj koncerton.

### Ĝui la urbon kaj la ĉirkaŭaĵon

Ni antaŭvidas promenojn al la vidindaĵoj de la urbo kaj ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo (ekzemple katedralo, „Petite France“, boata vizitado, eŭropaj institucioj, kavoj, muzeoj; vin-itinero, Colmar, Mulhouse, kastelo Haut-Koenigsbourg)

### Internacia partoprenantaro

Ni atendas partoprenon de homoj el pluraj landoj kaj certas, ke regos bela internacia etoso. Ja la kongresurbo troviĝas rekte ĉe la limo de Francio kaj Germanio, proksime de Svislando, ne tro for de Luksemburgio, Belgio kaj Nederlando...

### Kongresejo tuj apud la urbocentro

La kongresejo troviĝas en kvaronhora piedira distanco de la centro de Strasburgo (ekzemple la katedralo). La hotelo ofertas konvenajn salonojn kaj ĉambrojn de diversa grandeco kaj tiel ebligas komfortan kunvenon en unu domo.

## Lerni Esperanton kaj tuj apliki ĝin

Ni planas oferti konversacian rondon kaj kurson por progresantoj, eble ankaŭ por komencantoj, depende de la intereso. Tiel eblas en unu renkontiĝo eklerni la lingvon kaj tuj apliki ĝin en internacia rondo.

### Ĉu vi interesiĝas?

Tiam plenigu la paperan aliĝilon aŭ la retan ĉe [http://www.esperantoland.org/internacia\\_kongreso](http://www.esperantoland.org/internacia_kongreso).

### Kongrespartopreno (en eŭroj)

Aliĝo ĝis	15-a de aprilo	10-a de junio	poste
ĝis 17 jaroj	0		
18 ĝis 27	5	10	15
ekde 28 jaroj	45	60	70

La kotizo ne inkluzivas la ekskursojn.

### Tranoktado kun matenmanĝo (kongresejo; 7 tagoj)

Aliĝo ĝis	15-a de aprilo	10-a de junio	poste
1 pers. en 1-p. ĉambro	350	390	410
en 2-p. ĉambro	210	230	240
en 3/4/5-p. ĉambro	170	190	200

Ĉiu ĉambro havas duŝon, necesejon kaj kuirejan angulon/kuirejon.

## Aliĝu al la Internacia Kongreso!

Mi/ni aliĝas kiel plenpaganto(j).

Partopreno: 2010-08-06 ĝis 2010-08-13 aŭ aliaj datoj: \_\_\_\_\_

Persona nomo, familia nomo	viro/virino	naskiĝdato

Adreso, lando:

Telefono: \_\_\_\_\_ Telekopiilo: \_\_\_\_\_

Retpoŝta adreso (tre legeble!): \_\_\_\_\_